MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO
http://www.esperanto-mexico.org/

95ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, LA HAVANO, KUBO, 17 – 24 JULIO 2010[1]

KONGRESKOTIZOJ

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sekve sub B kaj C;

B: Iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko) kaj Afriko.

C: Ĉiuj landoj de Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto. **En la kazo de Meksiko, la peranto estas Meksika Esperanto Federacio (MEF), kontaktu nin tra** kasisto@esperanto-mexico.org . La Centra Oficejo en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2010. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

Validaj kongreskotizoj por la 95-a UK

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ	ĝis **31 dec. 2009** 1-a periodo[2]			ĝis **31 marto 2010** 2-a periodo			ekde **01 aprilo 2010** 3-a periodo		
Aliĝkategorio	A eŭroj	B eŭroj	**C eŭroj**	A eŭroj	B eŭroj	**C eŭroj**	A eŭroj	B eŭroj	**C eŭroj**
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG)	160	120	**80**	200	150	**100**	240	180	**120**
2. ne individua membro de UEA	200	150	**100**	250	185	**125**	300	225	**150**
3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	80	60	**40**	100	75	**50**	120	90	**60**
4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA	120	90	**60**	150	110	**75**	180	135	**90**

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro*

[1] Tiuj ĉi informoj estis prenitaj de la oficiala paĝo de la Universala Esperanto Asocio, kiu troviĝas ĉe http://www.uea.org/ . Nur ni aldonis informon pri la landa peranto en Meksiko.
[2] Jam ne aplikas.

(MG).

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 80 01 01 kaj 89 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 89 12 31;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

*** La kotizo ne inkluzivas loĝadon**, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

*** Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.**

*** Tiuj kaj pliaj informoj vi povas trovi ĉe** http://www.uea.org/kongresoj/2010/kotizoj.html

ATENTU! Se vi volas aliĝi al la 95ª UK pere de **Meksika Esperanto Federacio**, kontaktu nin pere kasisto@esperanto-mexico.org kaj konsideru ke ni bezonos la sekvajn informojn:

1) Familia(j) kaj persona(j) nomo(j),
2) ĉu vi estas viro / virino,
3) uea – kodo (se vi estas uea-membro),
4) adreso (en la nacia lingvo),
5) lando,
6) telefonnumero,
7) naskiĝdato,
8) retadreso,
9) indiki ĉu vi volas ke via adreso aperu en la kongresa libro aŭ ne,
10) se vi aliĝas kiel kunulo, bv. indiki la nomon / kodon de la cefaliĝinto,
11) se vi aliĝas kiel handikapulo, indiki ĉu uea jam havas la atestilon, en alia kazo aldoni ĝin,
12) se vi aliĝas senpage, bv. indiki la kialon.